

061.2 = 089.2(001)(058) : {172.16 : 323.381.3}

SAT-Jarlibro, 1952-1953. 152 paĝoj + mondkarto kaj kovrilo. Nur por membroj. Enhavo: Statuto de SAT, kaj aliaj organizaj regularoj, i.a. ankoraŭ regularo de la Literatura Komitato de SAT, kiu havas kiel taskon, laŭ lingvo kaj stilo kontroli la de SAT, LEA-oj aŭ eĉ privataj personoj publikigotajn verkojn. La libro informas pri la membroj de ĉiuj SAT-instancoj, ktp., la landaj perantoj, la diversaj Laboristaj Esperanto-Asocioj, pri laboristaj kaj fakaj esperanto-gazetoj, pri la libroj eldonitaj de SAT, ĝi enhavas tabelon pri la ĉefaj monoj kaj iliaj kurzoj, demografian tabelon, kiu montras por ĉiu lando, nacio aŭ teritorio la areon, la nombron de la homoj, fine de 1937 kaj fine de 1948, kaj la densecon de loĝantaro (1948). La paĝojn 41-146 okupas la adresaro de la membroj, kun indikoj pri profesio kaj aĝo. Laŭ la SAT-principo la lokoj estas aranĝitaj laŭalfabete, senkonsidere pri lando. Tio havus praktikan malavantaĝon, se la paĝoj 147-151 ne enhavus laŭlandan liston.

061.2 = 089.2(001)(093) : {172.16 : 323.381.3}

Historio de S.A.T. (1921-1952); 152 paĝoj; 132 × 198 mm²; prezo US \$ 1.30. Sendube interesa verko pri la neniel seneventa historio de Sennacieca Asocio Tutmonda. Mi mem estis membro de SAT en la plej tumulta periodo de ĝia ekzisto (ĉ. 1931) kaj estas interese nun vidi ĉiujn tiamajn okazaĵojn en ilia historia perspektivo. Ĉiu kiu interesiĝas pri la Esperanto-movado ĉi tie trovos — kiom mi povas priuĝi tion — fidindan historion pri la laborista alo de tiu movado.

Se la Statuto de SAT deklaras: „per komparo [de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado] ĝi (t.e. SAT) celas malebligi ĉe siaj membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj”, tio nepre sonas simpatie al miaj oreloj herezulaj. Sur p. 121 troviĝas fragmento el artikolo de R. Laval el *Sennaciulo*, Januaro 1950, kiun mi sekvigas ĉi tie:

„Ni ne deziras delogi de UEA ĝiajn membrojn. Kelkajn el ili ni eĉ tre volonte al ĝi lasas. Sed ni pretendas: ĉiu esperantisto, kiu estas nek ŝovinisto, nek absolutisto, nek ekspluatisto, — kiu estas liberama, liberpensema, tolerema, — kiu konscias, ke la nuna „sociordo”, fakte estas perforta malordo, kaj sopiras al vere homeca socio, — kiu ankoraŭ sopiras al sincera neŭtraleco, intergenta kaj interdenca: tiu sin deturnu de la neŭtraleco, kiu pli kaj pli aspektas kiel karikaturo de tiu vera neŭtraleco kaj venu al ni, ĉar inter ni, en SAT, estas lia loko. Tiu aŭdu la daŭre validan vokon: For la Neŭtralismon!

Laŭ Laval mia loko estas en SAT, kaj sendube ĝi estus en SAT, se SAT estus..... pli tolerema, ekzemple rilate al samtempa membreco de aliaj organizadoj, ekz. UEA. Ĉar kara estas al mi mia libero, provizore preferu mi restos ekstere.

{172.16 : 323.381.3} (05) = 089.2(100)

Sennacieca Revuo, n-ro 81 (1953), 60-paĝa; prezo 200 fr.fr. Tre interesa kajero, eĉ pli bona ol tiu de la antaŭa jaro, miaopinie. Ne preterlasu aĉeti kaj legi.

Poemoj de Omar Kajam, el la persa originalo tradukis G. Waringhien. Eldono de SAT. Broŝurita; 60 paĝoj; formato 137 × 183 mm². Prezo 250 fr.fr. aŭ \$ 0.65, aŭ egalvaloro.

La versaro de la persa astronomo Omar Kajam, 1040—1123 post Kristo, estas ĉefverko de la angla literaturo, en la rekreo de la poeto Edward Fitzgerald, eldonita en 1859.

Cetere ĝia vulgara famo estas eksterordinara en la brita mondo, ĉar ĝi atingis la plej ordinarajn homojn, por kiuj la belliteraturo estas tute fremda. Ĝi restas ofte legata kaj konstante citata, de liceaninoj en kaŝoj kaj etburĝoj en kaŝoj.

Antaŭ kelkaj jaroj d-ro Cecil Bean tradukis la rekreon de Fitzgerald, kaj nun profesoro Waringhien publikigas tradukon laŭ la persa originalo, kun bonega antaŭparolo pri la poeto kaj lia fono. Mi apenaŭ povas sufiĉe rekomendi la verkon.

Por anglo edukita laŭ la ritmo de Fitzgerald estas tre malfacile juĝi objekte la tradukon de Waringhien. Ŝajnas ke li plene redonas la etoson de la originalo, kaj iugrade ĝian sorĉon. Laŭdinda laboro, kiu meritas multe da studo.

K. R. C. Sturmer.

Karl Vanselow: *Nia Lingvo Esperanto*. Elektita poezio por deklamo kaj por kanto. Kajeroj 1-a, 2-a kaj 3-a de la 1-a serio. Eldono de Berliner Esperanto-Verlag, Berlin-Neukölln, Teupitzer Strasse 111. Ĉiu kajero nombras 32 paĝojn kaj kovrilon, kaj kostas 2 rpk. Mendanto kiu samtempe pagas la kompletan serion, senpage ricevos taŭgan kajerujon por ĝi. La tri kajeroj kune enhavas 125 simplajn kaj senpretendajn versaĵojn, inter kiuj troviĝas multaj tradukoj de popularaj kantoj, aŭ kanteblaj laŭ konataj melodioj. Plejparte ĉi tiuj versaĵoj jam aperis sur la paĝoj de Heroldo.

408.92(075.3) = 393

C. B. Zondervan kaj d-ro W. J. A. Manders, *Esperanto Leerboek*, eldonaĵo de J. Muusses, Purmerend, formato 151 × 227 mm², 107 paĝoj. Prezo f 2,50.

Lernolibro destinita por uzo en nederlandaj mezlernejoj kaj porinstruistaj seminarioj, kaj sendube taŭga por tiu celo. Iom malpli taŭga por sininstruado. En 32 lecionoj ĝi traktas ĉiujn precipajn gramatikajn instruojn, instruas ne malgrandan nombron da proverboj, informas pri la antaŭhistorio de Esperanto, kaj instigas al partopreno en la Esperanto-movado. Mi bedaŭras ke en tiu parto tro svarmas la esprimo „helplingvo”, eĉ kun la adjektivo „artefarita”. Ni sekvu, kun prof. Lapenna, la Zamenhofan ekzemplon, kaj simple parolu pri „la internacia lingvo”. Ja tio ĝi estas. La vorto „helplingvo” ja sugestas ion duarangon. Mi bedaŭras ke ĉi tiu lernolibro (same kiel multaj aliaj) en siaj vortolistoj ne klare indikas la karakteron de la vortradikoj, kaj ĉe verboj ne en ĉiuj kazoj kie tio necesas, la transitivecon, resp. netransitivecon.

Mi deziras al ĉi tiu nova lernolibro la sukceson kiun ĝi sendube meritas.

W. P. R.